

BONVENIGAS NIN JERUSALEM' ¹

(Miaj impresoj pri la 7-a Azia Kongreso de Esperanto)

*Estu ni el ajnaj teranguloj –
Bonvenigas nin Jerusalema'.
Eĉ se estis ni ĝis nun fremduloj,
Sentas nin parencaj pro l' gastem',
La gastemo de Jerusalema'. ²*



« Bonvenon al Israelo ! » - invitas Doron MODAN³

Mi kaj mia samlandanino Tatjana Loskutova el la centrorusia urbo Ivanovo partoprenis en la 7-a Azia kongreso de Esperanto, kiu okazis inter la 18-a kaj 22-a de aprilo 2013 en Jerusalemo.

Krome, ni partoprenis 4-tagajn antaŭkongresajn ekskursojn en la norda parto de la lando, organizitajn de la Esperanto-Ligo de Israelo. Estas tre bedaŭrinde, ke ni ne havis eblecon partopreni ankaŭ en la postkongresaj ekskursoj (la suda parto de Israelo), kiuj laŭ impresoj de niaj diverslandaj samideanoj estis ne malpli belaj. Sed tiu fakto de nepartopreno stimulas nin por reveno al Israelo en estonteco, pri kio mi eĉ ne dubas, ĉar Israelo estas unika lando ne nur pro sia glora historio kaj

¹ Citaĵo el la kanto «Venontjare – en Jerusalemo». Poemo de A.Dementjev, melodio de Mark Tiŝman. Traduko de L. Novikova.

² Ibidem.

³ En la eseo estas publikigataj fotoj, faritaj de L. Novikova, L.Rimon, A. Wandel, H. Bordin, N. Kotha k.a.

kulturo. Ĝi estas magia, ĝi ensorĉas ĉiun homon, kiu trafas sur tiun ĉi Di-benitan teron, kaj ne ellasas la animon por ĉiam. Same mi sentas magnetecan ligan kun ĝi.

Mi en tiu ĉi eseo dezirus esprimi miajn impresojn pri la vojaĝo kun uzo de preferindaj por mi formoj – poeziaĵoj kaj kantoj.

Mi estas judo kaj samtempe ruso ⁴

*Ni povas esti judoj, francoj, rusoj –
Ekzistas multe da naciaj nomoj –
Sed antaŭ ĉio ni ja estas homoj !⁵*

En Jerusalemo mi konatiĝis kun mia eksa samlandano, fama Esperanto-poeto Mikaelo Giŝpling, vizitinte lian hejmon kun Tatjana kaj niaj novaj israelaj amikoj Ĥanan Bordin kaj Tsvi Sadan. Estas paradokse, ke mi kaj la poeto dum kelkaj jardekoj loĝis en la sama urbo, sed renkontiĝis nur en Jerusalemo. Jam pro tio indus veni ĉi tien ! Miĥail Jakovleviĉ estas tre interesa, neordinara kaj simpatia homo. Malgraŭ sia respektinda aĝo li estas en sufiĉe bona sanstato (Dio donu al li ankoraŭ multajn jarojn !).

La versaĵoj de M.Giŝpling estis konataj al mi laŭ la antaŭe publikigitaj en Moskvo poemaroj. El tiuj publikaĵoj min precipe ravis la poemo “Jerusalemo”, kiun mi citos en mia eseo.

Ĉi foje li donacis al mi kaj Tatjana po ekzemplero (kun la aŭtografo) de sia lasta verslibro « Tie ĉi tie », kies poemoj respegulas la travivaĵojn kaj sentojn de la poeto dum la Israela viv-periodo. Mi ankaŭ emas uzi fragmentojn el tiujn ĉi belegaj versaĵoj.



**Gaste en hejmo de M.Giŝpling (de maldekstre : T.Loskutova,
M.Giŝpling, Tsvi Sadan, L. Novikova)**

⁴ Citaĵo el la samtitola poemo de M. Giŝpling // *Giŝpling M. Tie ĉi tie.* - Antverpeno, 2003.

⁵ Ibidem

Reveninte hejmen mi verve okupiĝis pri tradukado de rusaj versaĵoj kaj kantoj, dediĉitaj al Israelo, kiu tiom admirigis min. Mi malkovris por mi israelan poezian ciklon de la rusa poeto Andrej Dementjev, kiu dum pluraj jaroj loĝis en Israelo. En la eseo mi ankaŭ citos fragmentojn el tiu ĉi poemaro en mia traduko. Estas interese, ke multaj el tiuj ĉi versaĵoj kvazaŭ ilustras miajn fotojn (pli ĝuste inverse – multaj fotoj, kiujn mi publikigas ĉi tie, ilustras la poemojn de A.Dementjev). Mi, kiel ajna nuntempa turisto, abunde fotis dum la vojaĝo vidindaĵojn de Israelo kaj eventojn de la kongreso. Sed eĉ tiu ĉi ordinara afero – fotado – sur la neordinara tero alportis al mi mirindajn surprizojn, pri kiuj mi rakontos iom pli poste.

Ni estas popol' senhezita ⁶

*Nek limoj, nek mar' nin detenos,
Nek fort' de malica rival':
Al ni nia land' apartenos,
Jordano, montaro kaj val' !⁷*



Festa estrado en la kibuco « Maagan Miĥael »

Israelo estas sola, la plej unika ŝtato sur la tero. Perdinte antaŭ du miljaroj sian ŝtatecon sub premego de multnombraj invadintoj, la judoj, dissemitaj sur la tuta terglobo, sukcesis ne nur konservi sian nacian identecon, religion, kulturon kaj tradiciojn (kio jam estas ege mirinda !), sed per multegaj penoj kaj oferoj revenigi sian landon, sian popolon (kolektinte enmigrintajn samgentanojn el 102

⁶ Citaĵo el la poemo "Obstina gent'" de A. Brojdes // Antologio de hebrea poezio. - Tel Aviv, 1986.
Traduko de J. Kohen-Cedek.

⁷ Ibidem.

landoj)), revivigi sian jam ne uzatan parolan hebrean lingvon, kiu nun estas la ŝtata lingvo de Israelo. Oni en sangaj bataloj reakiris sian ŝtaton kun la antikva ĉefurbo Jerusalemo kaj sian sendependecon. Laŭ decido de la Unuiĝintaj Nacioj, la 14-an de majo 1948 estis proklamita fondiĝo de la ŝtato Israelo. Ĉi jare la 16-an de aprilo, dum nia ĉeesto en la lando, Israelo festis 65-jaran jubileon de sia sendependeco, okaze de kiu la organizantoj de la kongreso regalis nin per festa vespermanĝo kun bongusta vino. Ĉe ni aperis tiam demando – kial do festado okazis en aprilo, sed ne la 14-an de majo? Oni klarigis al ni, ke la hebrea kalendaro baziĝas sur lunaj cikloj, pro kio ĉiuj datrevenoj ĉiujare okazas en diversaj tempoperiodoj.

Do, ni bonŝancis ĉeesti tiun ĉi gravegan eventon! Uzante la okazon, mi ankoraŭfoje el la tuta koro gratulas la israelajn esperantistojn okaze de la ŝtata jubileo. Prosperu Israelo ĉiam!

Malgraŭ ĉiuj milit-perturboj, danĝeroj kaj malfacilaĵoj, kiujn travivis la popolo de Israelo dum tiuj jardekoj, ĝi sukcesis fari el la iamaj ruinoj kaj dezertoj belegan landon, similan al malgranda paradizo. Pro siaj tre variaj flaŭro kaj faŭno Israelo estas unu el la plej riĉaj landoj de la mondo. Ni konvinkiĝis pri tio dum niaj ekskursoj.

Ni venis renkontiĝi kun printemp'⁸

*Ni venis renkontiĝi kun printemp'.
Tedegis jam la vintro fortkatena.
Ĉi tie la ĉiel' - helblua step' –
Foriras nokte al dormej' stelplena.*

*Ni venis renkontiĝi kun moment'
De birda ĝojo, kiam flor' butonas,
De ventaj melodioj, de kviet',
De sunsubir', en kiu bunto dronas.*

La 14-an de aprilo ni grupe ekskursis en Jafo – antikva urbo, aperinta surborde de la Mediteraneo antaŭ 4000 jaroj. Nia ĉiĉerono estis Gavriel Zeevi. Ni promenis laŭ mallarĝaj stratetoj kaj sunplenaj placoj, vizitis modernan historian muzeon de la urbo, kie ni aŭskultis interesan rakonton de simpatia junulo Boris.

La vetero dum niaj antaŭkongresaj ekskursoj estis belega – suna, sed ne varmega (+23-25 gradoj). Post la neĝa aprilo en Moskvo ni ĝuis Israelan varmecon, belegan naturon, abundajn florantajn kreskaĵojn. Ni efektive sentis nin kvazaŭ en paradizo, precipe kiam ni trafis al la Bahaaj ĝardenoj en Hajfo – la oka Monda Miraklo. La ekskursojn en Hajfo kaj ties ĉirkaŭaĵoj gvidis Jehoŝua Tilleman.

⁸ El la samtitola poemo de A. Dementijev // *Dementjev A. Pripav k zemle obetovannoj.* – Moskvo, 2008. Traduko de L. Novikova.

Ni vizitis la Mondan Bahaisman Centron, kiu havas propran teritorion kun luksaj palacoj kaj aliaj konstruaĵoj, superbaj ĝardenoj kun fontanoj, florbedoj, diversspecaj ekzotikaj arboj kaj aliaj kreskaĵoj. Tiun belecon ne eblas priskribi – tion necesas vidi per propraj okuloj.



En la antikva Jafo



En la Bahaa ĝardeno



Mediterraneo. Sunsubiro

En Hajfo ni loĝis dum kvar tagoj en la malgranda kaj komforta hotelo «Port Inn». Nia grupo ne estis granda – nur 30-32 homoj, kaj ni rapide interkonatiĝis. Al mi tre plaĉis tiu familieca atmosfero. Krom Hajfo ni ekskursis al la biblio-fama Nazareto, al Akko – urbeto, kie en la antikva tempo baziĝis kruckavaliroj, kaj al la karmelita monaĥejo Stela Maris. Surborde de la Mediraneo ni vizitis unikajn markavernojn kaj klifojn «Roŝ Hanikra».



**La smeraldojn mara akvo
Dispecigas ĉe la rok'.
Se ekzistas la miraklo,
Ĝi troviĝas en ĉi-lok'⁹**

⁹ El la poemo "Hejmas mi en Israelo" de A. Dementjev. Traduko de L. Novikova.



En la mara kaverno

La 16-an de aprilo ĉiĉeronis Amri Wandel – prezidanto de Esperanto-Ligo de Israelo, unu el la ĉefaj organizintoj de la kongreso. Ni veturis al la lago Kinereto (kiun oni ankaŭ nomas Tiberia lago aŭ Galilea maro), apud kiu situas muzeo, kie ni vidis tre raran ekspoziciaĵon – antikvan boaton, kiun oni trovis en ŝlimo de la lago. Laŭ asertoj de sciencistoj tiu ĉi boato apartenas al periodo de vivo de Jesuo Kristo. Do, eble Li mem aŭ Liaj disĉiploj uzis ĝin. Ĝuste ĉi tie, sur la bordo de la Galilea maro okazis ĉiuj eventoj, priskribitaj en la Evangelioj. Ĉi tie Kristo paŝadis sur la laga akvo-surfaco por trankviligi la ŝtormon, pro kiu estis pereanta boato kun fiŝkaptistoj. Ĉi tie Li prezentis ankaŭ multajn aliajn miraklojn. Ni ankaŭ vizitis Kapernaumon – biblian lokon, kie laŭ la legendo ioman tempon loĝis kaj predikis Kristo kaj kie Li ankaŭ faris multajn siajn miraklojn.

Vizio de la Galilea maro



La Galilea maro antaŭ la ŝtormo

Ĉi tie okazis miraklo ankaŭ por mi. Bonvolu rigardi tiun malsupran foton. Mi faris ĝin en la muzea salono, meze de kiu staras vitra kubo kun la modelo de la boato de la Krista epoko. Mi celis foti ĝuste tiun ĉi modelon. Kiam poste, hejme, mi transmetis la foton en mian komputilon, mi kun mirego rimarkis strangan figuron en blanka vestaĵo post la kubo, kiu rigardas al la lago. Mi ne atentis tiun figuron dum la fotado. Mi nomis ĝin « Vizio de la Galilea maro ». La citaĵo el la Evangelio tre konvenas al tiu ĉi bildo. Kaj la poemo de Andrej Dementjev kvazaŭ ilustras la foton.



« Kiu do estas ĉi tiu ? Ĉar li ordonas eĉ al la ventoj kaj al la akvo, kaj ili obeas al li »

Jevangelio de Sankta Luko 8, 25

Kineret' ekkoleris
Kontraŭ homa fi-mond'.
La ondegoj ribelis,
Frapigante ĉe l' bord'...

En l' abisma infero,
En la akva kirlad'
Kun ĉemorta despero
Pereantis boat'.

Etendinte la manojn
Al ĉielo tra l' ond',
Preĝis la boatanoj
Al Kreinto de l' mond'.

«Faru savan miraklon!
Ni petegas pri l' ag'!»

Kaj surpaŝis Li akvon,
Trapasante sur lag’.

Kiel best’ en kaptilo,
Trankviliĝis la mar’.
Homoj ploris jubile
Pri la Dia glorfar’.

Ili pozis pi-dankaj
Pro l’ mirinda bonfart’.
En la vestoj purblankaj
Pluen iris Savant’¹⁰.

Amri vizitigis nin al la s-ro Cvi Loewenopf, 92-jaraĝa esperantisto, kiu loĝas en kibuco « Maagan Miĥael » surborde de la Galilea maro. Ni propraokule vidis faman kibucion kaj aŭdis rakonton pri ties fondiĝo kaj vivordo. Bedaŭrinde nun kibucoj en Israelo kiel kolektiva formo de mastrumado neniigās, ĉar junularo preferas translokiĝi al urboj, kaj en kibucoj plejparte restas maljunaj homoj.



Amri Wandel kaj Cvi Loewenopf en la kibuco « Maagan Miĥael »

Do, la antaŭkongresa programo estis interesa kaj varia, pro kio mi kore dankas niajn ekskurigvidantojn.

¹⁰ El la poemo « La Galilea maro » de A. Dementjev. Traduko de L. Novikova.

BLANKA JERUSALEMO

*Ĝi estis en purblanka vesto,
En diamanta diademo,
Samkiel fianĉin' dum festo,
Kun bela nom' Jerusalemo¹¹.*



La 18-an de aprilo ni translokiĝis al Jerusalemo, glora ĉefurbo de Israelo. Ĉiu homo de nia planedo havas revon almenaŭ foje dum la vivo viziti tiun ĉi sanktan urbon, centron de tri ĉefaj konfesioj de la mondo.

Adorkliniĝas mi, Jerusaleml!
La rev' pri vi ja ŝajnis senespera.
Nun ne finiĝas mia admirem',
Simile sentas olo* plenprospera.¹²

La unua impresoj pri Jerusalemo – ĝi estas blanka urbo, ĉar absolute ĉiuj ĝiaj domoj estas garnitaj per blankaj kalkoŝtonoj. Tia blankeco elvokas senton de pureco kaj festbeleco. Bone esprimis tion M. Giŝpling en sia poemo « Jerusalemo » :

¹¹ El la originala poemo “Songoj pri Jerusalemo” de L. Novikova (ne publikigita).

* Olo (en la hebrea lingvo « ole ») – enmigrinto, repatriulo en Israelo. Aŭtoro neologismo de L. Novikova.

¹² El la poemo “Eterna Jerusalemo” de A. Dementjev. Traduko de L. Novikova.

... Blankaj domoj, blankaj muroj rozkolore delikataj
Riveliĝas el krepusko renkontante la matenon.¹³

Kaj ankoraŭ unu specifan trajton de Jerusalemo – ĝian situon sur montoj kaj holmoj – respegulis la poeto :

... Kaj grimpante sur montetojn levas sin al la ĉielo
Ĉiam juna kaj eterna sankta urb' Jerusalem'.

La hotelo “Rabin” gastakceptis nin

La organizantoj de la kongreso loĝigis nin en la moderna gastejo « Rabin » en la nova parto de Jerusalemo. Tiu gastejo estis ankaŭ nia kongresejo. Ĝi estas tre oportuna, plene ekipita por okazigi kongresojn kaj konferencojn, kun diversgrandaj salonoj, manĝejo kun «sveda tablo», kie ni maten- kaj vespermanĝis ĉiutage. La loĝĉambroj estis du-, tri- aŭ kvarlitaj, ĉiuj komfortaj kaj puraj. Mi devas noti, ke tia modelo de dislokigo de partoprenantoj de Esperanto-aranĝoj estas la plej oportuna kompare kun spertitaj de mi antaŭe kondiĉoj de la universalaj kongresoj, kiam la kongresanoj estis dissemnitaj laŭ diversaj hoteloj kaj estis devigitaj perdi tempon kaj monon por atingado de kongresejo kaj aliaj ejoj por diversaj aranĝoj. Mi preferus ĉiam kongresi en la hotelo « Rabin » en Jerusalemo, ĉar ĝi estas ideala por niaj celoj.



Ĉeftemo de la kongreso estis «Ekologio de paco – kunvivado de homo, medio kaj naturo». Entute en la kongreso partoprenis 160 esperantistoj el 26 landoj, la plej grandaj grupoj venis el Israelo, Japanio kaj Ĉinio. La kongresa programo konsistis el tri partoj : ekde mateno ĝis la posttagmezo estis ekskursoj

¹³ El la poemo « Jerusalemo » de M. Giŝpling // *Giŝpling M.* Eola harpo. – Moskvo, 1999.

en kaj apud Jerusalemo, kiujn majstrece gvidis Amri kun siaj helpantoj; ĝis la vespermanĝo – kleriga programo (prelegoj, prezentado de filmoj k.s.) kaj vespere – artaj kaj distraj aranĝoj.



En akceptejo de la kongreso J. Tilleman kaj G. Zeevi
registras la partoprenantojn

Sireno de memoro¹⁴

La 19-an de aprilo ni ekskursis al la holokaŭsta muzeo, kiu ĉi jare ankaŭ celebris sian jubilean 60-an datrevenon. Kaj la 15-an de aprilo en Israelo estis tutnacia Tago de memoro pri ĉiuj israelanoj, pereintaj pro la amasa ekstermado kaj en la bataloj por la patrio. Kelkfoje dum la tagnokto sonis alarmsireno, kaj ĉiuj



¹⁴ El la samtitola poemo de A. Dementjev. Traduko de L. Novikova

judoj (kaj ni, gastoj de la lando) ekstaradis omaĝe al la herooj. Tiu ĉi tradicio estas tre kortuŝa, kaj ni, rusianoj, devus transpreni ĝin por nialanda Tago de memoro (la 22-a de junio).



Alarm' sirena...

Tio ploras ni

Pri la viktimoj

De la ekstermad'.

Rigardas el mallum'

Profunden de l' anim'

Milit'...

Teruras la rigard'.

A. Dementjev

Ho, kiel bone, agrable sidi, gefratoj, kune ! ¹⁵

Samtage posttagmeze okazis solena inaŭguro de la kongreso, kie nin oficiale salutis vicurbestro pri kulturo kaj arto. La ĉeestantoj aŭskultis salutojn de la organizantoj de la kongreso, inter kiuj elpaŝis la eliranta prezidanto de KAEM s-ro Teruhiro Sasaki kaj novelektita prezidanto Ruixiang Wang el Ĉinio.

¹⁵ Citaĵo el la israela popola kanto. Traduko de J. Murĵan



Prezidio de la solena inaŭguro de la kongreso
(de maldekstre A.Wandel, T. Sasaki, R. Wang)



Ĉina donaco



Mi naskiĝis en Azio
Ĉe la limo de Eŭropo.
Sed ne estis kolizio
Inter partoj de l' duopo.

Dison inter ter' Azia
Kaj Eŭrop' mi ne rimarkis.
Nur la fost' geografia
Per montriĵoj tion markis.

En junaĝ' ĉe ĝia vido
Pensis mi pri la demando :
Kion celas la divido
De tuteca mia lando,

De la sama kontinento
Sen disŝiro per markolo ?
Estas ĉu eksperimento
De sensenca, stranga volo ?

Nun sur ter' de Israelo
Mi, eŭropanin' Rusia,
Rigardante al ĉielo –
Ĉu eŭropa, ĉu azia,

Trovis solvon kompromisan
Por problemo de l' infano :
Mi korektu nomon misan -
Estu eŭropaziano.

L. Novikova



Trikonfesian malkonsenton kunigis nur Jerusalema' ¹⁶

Dum sekvaj tagoj ni havis ekskursojn al la Oliva Monto kun la vizito al la monaĥejoj Pater Noster, preĝejo de la vizito Ein Kerem, benediktina monaĥejo Abu Goŝ ; al la Malnova Jerusalemo kun la Templo Monto, la Templo de la Sankta Tombo kaj la Lamenta Muro. Ankaŭ impresigaj estis promeno en ekzotika naturo al la kajono Vadi Kelt (ekster Jerusalemo), ekskursoj al la moderna Jerusalemo: Kneset (Parlamentejo) kaj Israela Muzeo.

¹⁶ Citaĵo el la poemo "La Oldan urbon mi frekventas » de A. Dementjev. Traduko de L. Novikova.



Dum la ekskurso en la nova parto de Jerusalemo

Kiel mi jam notis, Jerusalemo estas centro de tri mondaj konfesioj: judaismo, kristanismo kaj islamismo. Kaj adeptoj de ĉiu el tiuj konfesioj amase vizitadas Jerusalemon por adorkliniĝi al siaj sanktaĵoj. Ni ankaŭ vizitis la ĉefajn religiajn lokojn.

Malĝojigas la tragika sorto de la plej grandaj sanktaĵoj de la judoj – la Unua kaj la Dua Temploj, kiuj estis detruitaj far la barbaraj uzurpuloj en la antikvaj tempoj. Restis nur muro de la Templo kaj ruinoj, al kiuj ĉiutage venas homoj (ne nur judoj) por preĝi al Dio kaj transdoni al Li siajn skribpetojn (sur la foto estas videblaj tiuj paperetoj, disŝovitaj en la fendoj de la Muro).

Sub ĝi malam', militoj kaj terur'
Entombigitaj estas por etern'.
Kaj konserviĝis parto de la Mur' –
Grizblanka pro la aĝo kaj desper'.

Oni ĝin nomas Muro de Lament'.
Pilgrimoj diverslokaj venas ĝin
Kun la pieca kaj amara sent'
Priplori sian Templon en ruin'.¹⁷

¹⁷ El la poemo «Super Marmora monto pendas lun' » de A. Dementjev. Traduko de L. Novikova.



Preĝado ĉe la Lamenta Muro




La kongresanoj ĉe la ruinoj de la Templo

Ni vizitis ankaŭ la Templan monton, kie en la XVI jarcento aperis Muzulmana kvartalo kun ensemblo de islamaj kultaj konstruaĵoj kun centra moskeo de Omaro (alia titolo - Kupolo de la Roko), konstruita sur loko de la detruita Dua Templo.



**Kaj post la Mur' - Omar-Moskeo
Etendis la kupolon al
Ĉiel', kaj altas duonsfero
Samkiel ora tas' - pial'^{* 18}.**

Kaj certe ni, anoj de la kristanisma mondo, strebis trafi en la Templon de la Sankta Tombo, la plej granda sanktaĵo por la Kristanoj. Ĝi ne aspektas tiom impone, kiel la islamaj moskeoj, ĉar ĝi estas simbola Tombo de Kristo. Sur tiu ĉi loko laŭ la legendo estis krucumita la Filo de Dio (tiu parton de la Templo oni nomas nun Golgoto) kaj kuŝis en la kaverno dum tri tagnoktoj (nun tiun lokon oni nomas Tombo de la Savanto) ĝis sia Ĉieliro.



**Patro nia, savu kaj pardonu...
Por ke ni memoru pri honor'.
Por ke ne prosperu la malbono.
Por ke vivu ni en beno, ne kun plor'.¹⁹**

^{*} Pialo (el la persa) – porcelana aŭ faenca taseto por teo sen tenilo.

¹⁸ El la poemo « Super Marmora monto pendas lun' » de A. Dementjev. Traduko de L. Novikova.

¹⁹ El la versaro «Strofoj» de A. Dementjev. Traduko de L. Novikova.

Ĉu Esperanto estas la tria uz-lingvo en Israelo?

Demando : Kiu lingvo estas la dua uz-lingvo en Israelo ?

Respondo : La hebrea.

(Israela anekdoto)

Kaj nun mi deziras montri al vi duan mirindaĵon, kiun mi fotis apud la Oliva Monto. De la unua rigardo ŝajnas, ke estas nenio superordinara – dum la multnombraj vojaĝoj tra Eŭropo mi ofte renkontis kvazaŭ-esperantajn surskribojn. Ĉi foje mi ankaŭ pensis, ke la titolo de la kafejo simple koincidas forme kun la esperanta vorto. Tamen kiam poste mi kontrolis laŭ diversaj vortaroj de la latinidaj lingvoj, evidentiĝis, ke la vorto kun tia ortografio ekzistas nur en Esperanto. Neniu el la israelaj esperantistoj, kun kiuj mi pridiskutis la demandon, povis klarigi la devenon de tiu ĉi titolo. Lige kun tio mi rememoris la anekdoton, kiun prezentis al ni nia grup-gvidanto Jehoŝua Tilleman (rigardu la moton).

Do, ŝajne aperis nova versio de tiu ĉi anekdoto, kiun eksplikas la subskribo de la foto). Restas enigmo : kiu lingvo ja estas la unua en Israelo ?



Ĉu Esperanto estas la tria uz-lingvo en Israelo ? (nova anekdoto)

En la kleriga programo de la kongreso estis prelegoj pri Indonezio (prezentis T. Loskutova), infanedukado en Vjetnamio, ĉina opero, la cunamo-katastrofo en Japanio. Okazis debato pri la paco en la Mezoriento, gvidata de Renato Corsetti, kaj prelego pri moderna pentrarto en Israelo. Ankaŭ okazis kunsidoj de KAEM, en kiuj estis elektita nova prezidanto de KAEM kaj estis akceptita decido pri la loko por la 8-a Azia Kongreso en 2016 en Ĉinio.

Al ĝojo veku vian koron²⁰

En la arta programo, kiel ofte okazas en Esperanto-aranĝoj, ĉefludis JoMo kaj la vokala duopo “Kajto”, kiuj kantigis kaj dancigis la kongresanojn. Sian artan programon prezentis ankaŭ israelaj dancgrupoj : oni ĝuigis la publikon per orientaj (ventraj) dancoj kaj per ekzotika eŭritmia dancado. Dum la lastvespera Internacia koncerto montris siajn talentojn esperantistoj el pluraj landoj. Atmosfero de la artaj vesperoj ĉiam estis gaja, la kongresanoj kun plezuro aŭskultis la artistojn kaj mem kantis kaj dancis.



²⁰ Citaĵo el la israela popolkanto “Ĝoju fratoj”. Traduko de A. Wandel.

Venontjare – en Jerusalemo !

*Ni forportas en valiza pleno
Notlibretojn kun la adresar'...
"Venontjare – en Jerusalemo!" –
Diras al najbaro la najbar'.²¹*

Krom la komunaj aranĝoj estis apartaj personaj invitoj por mi kaj Tatjana al hejmoj de niaj novaj israelaj amikoj Ĥanan kaj Tsvi (krom jam menciita supre vizito al Miĥail Giŝpling). Tiuj ĉi renkontiĝoj estis tre impresriĉaj. La amikoj kiel veraj ĝentlemanoj helpis al ni en malfacilaj por ni situacioj de alveno al Israelo (ni venis sabate kaj havis problemon pri atingo de la hotelo en Tel-Avivo pro nefukciado de la amasaj trafikiloj) kaj forflugo (pezaj valizoj!). Ili kore adiaŭis nin dum la lasta vespero, invitinte ofte vizitadi Israelon. Ni memoras pri la invito !



Tatjana Loskutova, Renato Corsetti kaj Ĥanan Bordin

La neforgeseblaj dek tagoj en Israelo finiĝis. Ni tutkore dankas ties organizintojn, israelajn esperantistojn kaj gvidantojn de KAEM, kiuj sindoneme preparis por ni tiun ĉi feston.

Trans fenestro la aŭtun' tristemos,
Ploros pluvo, zumos venta ĝem'.
"Venontjare – en Jerusalemo !", -
Mi promesos pense al mi mem.²²

²¹ El la kanto "Venontjare – en Jerusalemo". Poemo de A.Dementjev, melodio de Mark Tiŝman. Traduko de L. Novikova.

²² Ibidem.